

Veranstaltungshinweise

Unsere Esp.-Lernrunden für: a) Anfänger m. Vorkenntnissen (Stufe A2¹): Mi. 18:00-19:30 Uhr, Gemeindehaus d. kath. Kirchengemeinde St. Willehad, St.-Willehad-Str. 37, 26954 Nordenham; b) Fortgeschrittene (Stufen B1, B2, C1¹): Do. 19:15-20:45 Uhr, Ev.-luth. Kirchengemeinde Brake, Kirchenstr. 24, 26919 Brake, oder – *oft im Winter* – als Skype-Konferenz.

¹)Stufen: s. http://de.wikipedia.org/wiki/Gemeinsamer_Europ%C3%A4ischer_Referenzrahmen

14.06.2014 13:30 Uhr	Bremer Stadtwald: Torfkahnfahrt; dann Kaffeetrinken im <i>Haus am Walde</i> , Kuhgrabenweg 2, 28359 Bremen	Juni-Ausflug 2014
10.07.2014 19:30 Uhr	Gaststätte <i>Weserlust</i> , Kaje 1, 26919 Brake	Vereinstreffen
21.08.2014 19:30 Uhr	Gaststätte <i>Weserterrassen</i> , Strandallee 10, 26954 Nordenham	Vereinstreffen
18.09.2014 19:30 Uhr	Gaststätte <i>Kogge</i> , Rathausplatz 7, 26931 Elsfleth	Vereinstreffen
16.10.2014 19:30 Uhr	Gaststätte wird noch festgelegt Bremen-Vegesack	Vereinstreffen

Gäste sind willkommen. Aktuelles u. Einzelheiten können unserer Netzseite <http://www.esperanto.de/unterweser/aranghoj.htm> entnommen oder bei Alke Geveke, Tel.: 0160-3760850, erfragt werden; allerneueste Infos: <https://twitter.com/egu1995>. Außerdem:

28.05.-01.06.2014	Printempa BARo	Bad Münde
06.-09.06.2014	91. Deutscher Esp.-Kongress	Erfurt
06.-12.07.2014	10. Europäischer Esp.-Kongress	Rijeka, Kroatien
12.-20.07.2014	Somera Esperanto-Studado	Nitra, Slowakei
26.07.-02.08.2014	99. Esperanto-Weltkongress	Buenos Aires, Argentinien
19.-24.10.2014	4. Esperanto-Herbstwandertage	Marienburg/Mosel

Impressum:

Zeitschrift: Esperanto Gazeto (ISSN 1861-3330)
Erscheinungsweise: dreimal jährlich als Druck- u. elektronische Ausgabe,
Netzseite: <http://www.esperanto.de/unterweser/gazeto.htm>

Herausgeber: Esperanto-Gruppe Unterweser e. V.
(<http://www.esperanto.de/unterweser>)

Information und Redaktion: Anne Höpken, Schulstr. 13a, 26954 Nordenham, Tel.: 04731-4837
Dörte Bierkämper, Tel.: 04404-3368
Dr. Andreas Kück, Tel.: 04702-5044
Mario Müller, Tel.: 04732-1373

Bankverbindung

(für Beiträge und Spenden): Raiffeisenbank Oldenburg eG
IBAN: DE26280602281200160000
Kassenwartin: Dörte Bierkämper

EGU - Esperanto - Gruppe Unterweser e. V.

Esperanto Gazeto

N-ro 40

ISSN 1861-3330

Jun. – Sep. 2014

EGU-Info: <http://www.esperanto.de/unterweser>



Bremen, 10.05.2014: Esperanto-Info-Pavillon unseres Vereins bei der Veranstaltung „Bremen mischt mit – Europa. Kulturen. Sprachen“, organisiert vom Sprachenrat Bremen e. V.

Bremen, 10a de Majo 2014: Esperanto-inform-pavilono de nia klubo ĉe la aranĝo „Bremen mischt mit – Europa. Kulturen. Sprachen“, organizita de Sprachenrat Bremen e. V.

**Niaj klubrenkontiĝoj en printempo 2014:
Gasto el Hamburgo, keglado kaj universitata biblioteko
(Nordenham, 27a de Marto, Berne, 5a de Aprilo, kaj
Oldenburgo, 15a de Majo 2014)**

En Marto partoprenis Kerstin el la Hamburga Esperanto-grupo en nia klubrenkontiĝo. Venontjare festos tiu grupo sian 111-jariĝon kaj ni nian 20-jaran jubileon. – En unu el niaj du klubrenkontiĝoj en Aprilo estis sporte: Keglado estis en la programo. – En Majo gvidis nin Brigitte tra la ĝis meznokte ne-fermita universitata biblioteko de Oldenburgo. Ŝi klarigis al ni la katalogsistemon kaj trovadon pere de unu ekzemplero el la ĉirkaŭ 1,3 milionoj da libroj kaj 3.800 fakrevuoj. Interesaj estis precipe la kolekto de filmprojekciiloj, televid- kaj radioaparatoj de la lasta jarmilo kaj krome lueblaj ŝloseblaj kompaktaĵstudkabinetoj. – Andreas

**Unsere Vereinstreffen im Frühjahr 2014:
Gast aus Hamburg, Kegeln und Universitätsbibliothek
(Nordenham, 27.03., Berne, 05.04., und Oldenburg, 15.05.2014)**

Im März nahm Kerstin von der Hamburger Esperanto-Gruppe an unserem Vereinstreffen teil. Nächstes Jahr feiert die Gruppe ihr 111-jähriges Bestehen und wir feiern unser 20-jähriges Jubiläum. – In einem unserer zwei Vereinstreffen im April ging's sportlich zu: Kegeln stand auf dem Programm. – Im Mai führte uns Brigitte durch die bis Mitternacht geöffnete Universitätsbibliothek Oldenburg. Brigitte erläuterte uns das Katalogsystem und Finden anhand eines Exemplars aus den etwa 1,3 Mio. Büchern und 3.800 Fachzeitschriften. Interessant waren besonders die Sammlung von Film-



Alte Filmprojektoren / Malnovaj filmprojekciiloj

projektoren, Fernseh- und Radiogeräten des letzten Jahrtausends sowie mietbare abschließbare Kompakt-Studierkabinen. – Andreas

wir feiern unser 20-jähriges Jubiläum. – In einem unserer zwei Vereinstreffen im April ging's sportlich zu: Kegeln stand auf dem Programm. – Im Mai führte uns Brigitte durch die bis Mitternacht geöffnete Universitätsbibliothek Oldenburg. Brigitte erläuterte uns das Katalogsystem und Finden anhand eines Exemplars aus den etwa 1,3 Mio. Büchern und 3.800 Fachzeitschriften. Interessant waren besonders die Sammlung von Film-

Haiku / Hajko

Ein Haiku (Esperanto: *hajko*) ist eine japanische Kurzgedichtsform mit drei Wortgruppen von 3 - 5 - 3 Lauteinheiten. In einem Haiku wird nicht beurteilt, sondern nur beschrieben, oft mit Bezug zu Natur und Jahreszeit. Im Esperanto besteht ein *hajko* aus drei Zeilen mit 5 - 7 - 5 Silben. Es folgt ein Beispiel von Andreas:

Printempa vesper':

Reflektighas varma sun'

Sur glata Vezer'.



*Nach Originalquellen
nachgebaut:
Foucaultsches Pendel
zum anschaulichen
Nachweis der Erdrotation
(Standort:
Universitätsbibliothek
Oldenburg, Haarentor) /
Postkonstruita laŭ
originalaj fontoj: pendolo
de Foucault por la ilustra
pruvo de la terrotacio
(situo: universitata
biblioteko de
Oldenburgo, Haarentor)*



Sprichwort

Schuster, bleib bei deinem Leisten.

Proverbo

Ne rezonu pri tio, kio estas ekster via metio.

(el la *Proverbaro de Esperanto*,
verkita de L. L. Zamenhof; kun aliaj
proverboj en <https://twitter.com/retkoboldo>)

Tip: ein E-Grammatikbuch und ein E-Wörterbuch für Esperanto

Elektronische Bücher haben einen Vorteil: Mit seinem Smartphone hat man sie immer zur Hand, platz- und gewichtssparend. Da liegt es doch nahe, dass es auch für Esperanto zumindest ein Grammatikbuch und ein Wörterbuch in elektronischer Form geben sollte, und zwar mit Deutsch als Erläuterungs- bzw. Übersetzungssprache. Und in der Tat ist diese Lücke jetzt geschlossen: Mit seinem „Esperanto – Einführung in die Grammatik“ richtet sich Michael Lennartz vor allem an deutschsprachige Anfänger, für die die einsprachigen mehrere hundert Seiten umfassenden Standardwerke ungeeignet sind. Lennartz' E-Buch ist kostenlos unter <http://www.majkel.de/wb/pages/esperanto-lernen/ebooks-esperanto-to-go.php> herunterladbar und beruht hauptsächlich auf den Werken „Esperanto-Lehrbuch“ von Theodor Wittenberger und „Ausführliche Sprachlehre des Esperanto“ von Hermann Göhl. – Das im Kindle-Format für 0,89 € unter <http://www.amazon.de/dp/B00FDTTW3E> beziehbare „Wörterbuch Esperanto Esperanto-Deutsch Deutsch-Esperanto“ von Andreas Kück umfasst etwa 22.000 Stichwörter und Redewendungen in beiden Teilen und beruht im Wesentlichen auf Andreas Kücks gedrucktem „Praktisches Wörterbuch Esperanto Esperanto-Deutsch Deutsch-Esperanto“. Weitere Infos: <http://www.akueck.de/eowb.htm>.

– Andreas

**Nia klubo ĉe la aranĝo “Bremen mischt mit – Europa. Kulturen. Sprachen”
 (“Bremeno kunagas – Eŭropo. Kulturoj. Lingvoj”),
organizita de Sprachenrat Bremen e. V.
(Bremeno, 10a de Majo 2014)**



Auch Esperanto-Freunde mischen mit / Ankaŭ Esperanto-amikoj kunagas

Kvankam antaŭtagmeze estis ankoraŭ bona vetero, nur malmultaj interesatoj venis en nian inform-pavilonon. En ĝi Alke, Anke, Anne, Dörte, Günther kaj Hellmut informis pri Esperanto. Sur la scenejo kontraŭe okazis interesaj programeroj; tial kaj por la vizitantoj kaj por ni estis ĉiam distre. Krome rekte apud ni prezentis la klubo "Kultur vor Ort e. V." arkivon de lingvoj aŭdeblaj per mp3-ludigilo. Tiel ankaŭ ni ekhavis impreson de la sono de diversaj lingvoj; inter ili estis kelkaj apenaŭ konataj al ni. – Anne

Pro stranga mete(or)ologia respondo: La Akademia ŝipo en ŝtorma vetero

Anstataŭ la unuradikaĵon "ŝip" oni sinonime ne uzu la unuradikaĵon "nav". Pri tiu ĉi memkompreneblaĵo atentigis Zamenhof en unu el siaj lingvaj respondoj. Per ĝi li ilustris instruon de la Antaŭparolo al la Fundamento de Esperanto pri formo nova al formo oficiala. Formon novan povas rekomendi nur laŭe rajtigita institucio, nuntempe la Akademio de Esperanto. Tiu ĉi efektive aprobis per oficialigo aŭ almenaŭ tolerdeklaro kelkajn formojn novajn, kiel ekzemple "prolet" (al "proletari") kaj "konvers" (al "konversaci"); pli: <http://www.akademio-de-esperanto.org/aktoj/aktoj1/komunikajhoj.html>. La siatempa Akademio ankoraŭ konsciis la bezonon je tia formala procedo por tiaj okazoj. Sed kiel statas pri la nuntempa Akademio? Ties Lingva Konsultejo neis la demandon, ĉu la nek oficiala nek internacia "meteologi", sinonime uzata al la internacia kaj oficiala "meteorologi", estas kontraŭ-Fundamenta (<http://akademio-de-esperanto.org/konsultejo/blogo/2013/05/chu-meteorologio-estas-kontraufundamenta/>), kaj samtempe ekskluzivis eventualan analizeblecon kiel kunmetaĵo "mete'o'logi". (Ĝin cetere pravigas tia analizebleco.) Kelkaj partoprenantoj en la diskutlisto "AdE-diskuto"

(<https://groups.yahoo.com/neo/groups/AdE-diskuto/info>) tie atentigis pri la kontraŭnormeco de tiu Konsulteja respondo. La diskutado fariĝis tre emocia kaj akra, ĉar malkaŝiĝis ankaŭ aliaj malperfektaĵoj de la Akademio: Laŭ ĝia Sekretario uzado de ekzemple "kurt" sinonime al "mal'long" estas kontraŭ-Fundamenta. Ne pravigebla aserto, ĉar: Li pretervidas, ke "mal'long" ne estas formo, sed jam kunmetaĵo el du formoj. Kaj formon sinoniman al kunmetaĵo el pluraj formoj ĉiu rajtas uzi eĉ sen ia tolerdeklaro aŭ internacieco. Ankaŭ aliaj kundiskutantaj Akademianoj evidentigis sciomankon pri gravaj normaj instruoj aŭ la Akademia statuto: La Direktoro de la Komisiono pri Historio de la Akademio de Esperanto false asertis, ke tiu statuto "neniel parolas pri la Fundamento (majuskle) sed pri 'fundamentaj (minuskle) principoj' ..." Alia Akademiano mesaĝis mem-elpensitajn kromregulojn al la Fundamenta Regulo 15 pri internaciaj vortoj. Pliaj ekzemploj estas en la blogeroj "Akademio plendas, ke esperantistoj citas la Fundamenton" (<http://www.ipernity.com/blog/bernardo/715561>) de Bernhard Pabst kaj "Akademio de Esperanto fermas 'AdE-diskuto'" (<http://www.ipernity.com/blog/55667/714681>) de Andreas Kück. Al "AdE-diskuto", kies fermon decidis la Akademia estraro, jen alternativo: la Ipernity-grupo "Lingvaj demandoj de Esperanto" (<http://www.ipernity.com/group/628095/discuss>). – Andreas

30a Printempa Semajno Internacia (PSI) (Xanten, 14a ĝis 21a de Aprilo 2014)

Kiel ĉiujare ĉirkaŭ Pasko ankaŭ en 2014 okazis PSI, ĉi-foje en la junulargastejo Xanten Sudmaro ĉe la malsupra Rejno (<http://www.esperanto.de/psi/2014/>). Situante en belega pejzaĝo, tiu moderna domo ofertis abundan spacon por preskaŭ 100 partoprenantoj el diversaj partoj de Eŭropo, inter ili ankaŭ kvar membroj de nia klubo: Elisabeth Kuhl-Kruse, Franz Kruse, Brigitte Kranz kaj Stefan Krieghoff, kiuj



*Jugendherberge Xanten Südsee /
Junulargastejo Xanten Sudmaro*

ĉiuj de multaj jaroj partoprenas en PSI ĉiam denove. PSI estas unu el la plej grandaj aranĝoj de Germana Esperanto-Asocio (GEA) kaj okazis jam je la 30a fojo. La programo konsistas, kiel ĉiam, el lingvokursoj, prelegoj pri diversaj temoj kaj sportaj ofertoj antaŭtagmeze, ekskursoj posttagmeze kaj kulturaj

aranĝoj vespere. Esperanto-kursoj estis ofertitaj en kvar lingvaj niveloj, prelegoj



Archäologischer Park / Arkeologia parko

ekzemple pri fastado, la politika situacio en Katalunio, la artefarita lingvo Toki Pona, rapidtraĵoj, abeloj kaj esprimmanieroj de la amo. Sebastian Kirf, la prezidanto de GEA, raportis pri aktualaj aktivadoj de la GEA-estraro. La ekskursiva programo estis precipe influita de la mil jarojn longa romana historio de Xanten (Ksanteno), i. a. estis ofertitaj urbgvidado tra Xanten, vizito de la Kriemhild-muelejo kaj de la arkeologia parko. Krome okazis bicikla ekskurso al Wesel kaj tuttaga ekskurso al la plej malnova urbo de Nederlando, Nijmegen. Kiel vesperaj aranĝoj estis Ĝepardi!, televida kvizo konata el Usono, kostumbalo sub la moto "Romanoj kaj germanoj", koncerto de Kajto kaj pupteatraĵo de Zauberbühne (<http://www.zauberbuehne.de>). En la oferto por infanoj estis interalie Mazi-kurso, manlaboro kaj slojdado antaŭtagmeze kaj piĝamaj rakontoj vespere kaj krome por la junularo interalie ĥaosludo kaj tablotenisa turniro. Krom tio preskaŭ daŭre estis montritaj 4D-filmoj kun Esperanto-subtekstoj en kinejo speciale aranĝita tiucele. Konkize: Ĉiom sukcesa aranĝo, kiu denove faris multan plezuron. – Stefan Krieghoff

30. Internationale Frühlingswoche (PSI) (Xanten, 14.-21.04.2014)

Wie jedes Jahr um Ostern fand auch 2014 die Internationale Frühlingswoche (PSI) statt, diesmal in der Jugendherberge Xanten Südsee am Niederrhein (<http://www.esperanto.de/psi/2014/>). Landschaftlich sehr schön gelegen, bot dieses moderne Haus reichlich Platz für die annähernd 100 Teilnehmer aus verschiedenen Teilen Europas, unter ihnen auch vier Mitglieder aus unserem Verein: Elisabeth Kuhl-Kruse, Franz Kruse, Brigitte Kranz und Stefan Krieghoff, die alle schon seit vielen Jahren immer wieder am PSI teilnehmen. Das PSI ist eine der größten Veranstaltungen des Deutschen Esperanto-Bundes (DEB) und fand nun bereits zum 30. Male statt. Das Programm bestand wie immer aus Sprachkursen, Vorlesungen zu verschiedensten Themen und Sportangeboten am Vormittag, Ausflügen am Nachmittag und Kulturveranstaltungen am Abend. Esperantokurse wurden für vier Sprachniveaus angeboten, Vorlesungen z. B. über das Fasten, die politische Lage in Katalonien, die Kunstsprache Toki Pona, Hochgeschwindigkeitszüge, Bienen und Ausdrucksweisen der Liebe. Sebastian Kirf, der Präsident des DEB, berichtete von den aktuellen Aktivitäten des DEB-Vorstands. Das Ausflugsprogramm war besonders durch die Jahrtausende lange römische Geschichte von Xanten geprägt, u. a. wurden eine Stadtführung durch Xanten, Besuch der Kriemhild-Mühle und des archäologischen Parks angeboten. Daneben fanden eine Fahrradtour nach Wesel und ein Ganztagesausflug zu der ältesten Stadt der Niederlande, Nijmegen, statt. Als Abendveranstaltungen gab es Gepardi!, ein aus den USA bekanntes TV-Quiz, einen Kostümball unter dem Motto „Römer und Germanen“, ein Konzert von Kajto und ein Puppentheater der Zauberbühne (<http://www.zauberbuehne.de>). Im Angebot für Kinder waren ein Mazi-Kurs, Handarbeit und Basteln am Vormittag und Pyjama-Erzählungen am Abend sowie für die Jugend das Chaos-Spiel und ein Tischtennisturnier. Außerdem liefen fast permanent 4D-Filme mit Esperanto-Untertiteln in einem eigens dafür aufgebauten Kinoraum. Kurzum: Rundum eine gelungene Veranstaltung, die wieder viel Spaß gemacht hat. – Stefan Krieghoff



Romaj spuroj / Römische Spuren

Das Ausflugsprogramm war besonders durch die Jahrtausende lange römische Geschichte von Xanten geprägt, u. a. wurden eine Stadtführung durch Xanten, Besuch der Kriemhild-Mühle und des archäologischen Parks angeboten. Daneben fanden eine Fahrradtour nach Wesel und ein Ganztagesausflug zu der ältesten Stadt der Niederlande, Nijmegen, statt. Als Abendveranstaltungen gab es Gepardi!, ein aus den USA bekanntes TV-Quiz, einen Kostümball unter dem Motto „Römer und Germanen“, ein Konzert von Kajto und ein Puppentheater der Zauberbühne (<http://www.zauberbuehne.de>). Im Angebot für Kinder waren ein Mazi-Kurs, Handarbeit und Basteln am Vormittag und Pyjama-Erzählungen am Abend sowie für die Jugend das Chaos-Spiel und ein Tischtennisturnier. Außerdem liefen fast permanent 4D-Filme mit Esperanto-Untertiteln in einem eigens dafür aufgebauten Kinoraum. Kurzum: Rundum eine gelungene Veranstaltung, die wieder viel Spaß gemacht hat. – Stefan Krieghoff



Partoprenantoj / Teilnehmer